

**MAJSTRO
KRABATO,
LA BRAVA SORABA
SORĈISTO**

de Měrcin Nowak-Njehorński

el la suprasoraba de Michael Wolf

Titolo de la originalo: Mišter Krabat dušny serbski kuzłar
eldoniĝinta en la eldonejo Ludowe nakładnistwo Domowina
Budyšin, 4. trarigardita eldono 1988

1

Estis antaŭ sufiĉe multe da jaroj – atendu, estis antaŭ ĉirkaŭ tricent jaroj, tuj post tiu granda milito, kiu tridek jarojn furiozis kaj glutis tiom da vilaĝoj kaj urboj kaj homoj. Estis tiutempe tre trista kaj kruela tempo, tiom terura, ke oni ne povas priskribi tion. Soldatoj kaj rabistoj tute forbruligis urbojn, vilaĝojn kaj bienojn. Kie la homoj ne estis mortbatitaj, tie oni prenis ĉian havaĵon for de ili. La tuta popolo venis al la lasta fadeno kaj estis malriĉa kiel vera senhavulo. Efektive kaj vere, la sovaĝaj bestoj dum tiu tempo kondukis pli home ol kiu ajn homo!

Sed, ĉiuj homoj ne fartis tiutempe tiom malbone. Junkroj ja fartis eĉ pli bone ol antaŭe. Dum la milito la oficiroj ŝtelkolektis al si sufiĉe da fremda propraĵo. La imperiestro en Vieno jam ne rajtis ordoni al ili, do ili povis fari, kio plaĉis al ili. Kaj ĉiuj – la princoj-elektistoj kaj la princoj, la dukoj kaj la grafoj kaj tiu tuta nobela koterio nur volis diboĉi ĝistede, ekscesi kaj dum tio ekspluati, malvesti, torturi kaj turmenti subulojn, kompatindajn servutulojn kaj fari al ili tian maljustaĵon, ke ŝtono ekkompatus.

Plej malbone tiutempe Sorabio fartis. Ĉi tie malriĉeco kaj malgajeco mem stringis la vilaĝan popolon, la batito devis porti la nebatiton, la junkroj skurĝis kaj turmentis la sorabajn servutulojn, malpermesis al ili ankoraŭ amuziĝojn, dancojn kaj festan kostumon. Ĝoji kaj sin amuzi rajtis nur la mastro. Kamparano devis pagi trinkokoston, devis servuti kaj stari ĉiutage en jugo. La pastroj tamen admonis la martirigitan popolon el la ambonoj, ke ĝi portu sian krucon tolerema kaj humila kaj ke ĝi estus rekompencata por tio en la ĉielo.

La paroĥanoj tamen plej ofte ne komprenis la vortojn de la animzorganto, kiu ne parolis en ilia gepatra lingvo. Ne mirige, ke ili prefere kelkfoje kondukis

laŭ la malnova proverbo, ke kamparano samtempe dehaku la kapon al juna kverko kaj juna mastro, kaj ke poste ili kaptis falĉilon, draŝilon kaj sterkhojn por limigi tiun tro grandan maljustecon.

Memkompreneble, multe tio ne helpis, la mastro ja baldaŭ denove venkis, kaj la venkobatitaj senhavuloj devis plu servuti kruele. Kaj ili sopiris al tio, ke la dormantaj herooj vekigis en la Kokomonto kaj liberigos landon kaj popolon. Kaj ili rakontis en siaj fabeloj pri tio, ke samlandano aperis el la popolo, neordinara heroo aŭ fortulo, sorĉisto aŭ iu, kiu, sciante sekretajn fortojn, sorĉaĵojn kaj sorĉajn parolojn kaj diversajn sci-ojn, fariĝos pli potenca ol tiuj perfortuloj en tiuj burgoj.

2

La plej malriĉaj inter la malriĉaj sorabaj vilaĝanoj estis paŝtistoj, kiuj devis peli ŝafojn, porkojn kaj bovojn al la paŝtejo dum ĉiu vetero, tagon post tago, por dommastroj kaj paŝti tie de sunleviĝo ĝis la unua trembilo de la vesperstelo. Kaj tia malriĉa paŝtisto ankaŭ vivis en la vilaĝeto Jitk ĉe la rando de la soraba erikejo. Li vere ne fartis pli bone ol ĉiuj aliaj ŝafistoj, porkistoj kaj bovistoj. Li devis vivi magre kaj precipe dum vintro li ofte suferis malsaton, ke li estus povinta ligi al si nodojn en la intestaro.

Kaj tiu Jitka paŝtisto havis knabon, ne propran, sed duonfilon, kiu nomiĝis Krabato. Tial estas kompreneble, ke la juna Krabato devis perlabori sian ĉiutagan panon kaj sanon de infanaĝo, ne rajtis maldiligenti, sed devis paŝti la anserojn de la vilaĝaj mastroj, por ke li lernigu al si paŝtadon iom post iom. Printempe kaj somere tiu ĉi anserpaŝtado ankaŭ ne estis tia malbona okupiĝo, precipe ne tiam, kiam la suno tiom agrable varmigis kaj poste la floroj

floris sur la paŝtejo kaj buntaj papilioj ŝanceliĝis tra ili kaj birdoj kantis diversmaniere en arbustoj kaj en la proksima erikejo. Kiom multe tie ne estis videbla kaj aŭdebla!

La juna Krabato ankaŭ ne povis satvidi sin pri tio, kion li vidis ĉirkaŭe, kaj estus volente vidinta, sciinta kaj koninta eĉ pli multe.

Ŝajnis al li, ke la tuta mondo estis plena de mirakloj, sekretoj kaj enigmoj kaj ne estis ĉi tie neniu, kiu povus instrui lin pri ĉio kaj riveli al li ĉiujn sekretojn de la mondo.

Jes, la juna Krabato estus tiom volonte lerninta, multe lerninta, sed vi devas scii, ke tiutempe ankoraŭ ne estis lernejoj, almenaŭ ne por malriĉaj infanoj de la vilaĝaj servutuloj. Lernejon frekventis nur filoj kaj filinoj de noblaj kaj riĉaj homoj, junkroj kaj de aliaj riĉuloj. Kaj tiuj junkroj kaj riĉuloj opiniis, ke estus pli bone, se la senhavuloj plurestis stupidaj, ĉar tiel ili povis ekspluati ilin pli bone.

Kaj tiel la malgranda Krabato devis paŝti kun sia paĉjo de Walpurgo ĝis Simono kaj Judo kaj kelfoje eĉ pli longe, ĝis kiam la frostoj tranĉis kaj la vintraj papilioj flugis kaj la malvarmego pelis ilin en la paŝtistan domon.

La vintro ne estas la amiko de la malriĉuloj; ĝi ankaŭ alportas mizeron kaj malsaton en la paŝtistan domon. La patrino de Krabato ofte ne sciis, de kie ŝi ricevu farunon kaj milion por supo kaj kaĉo, jes, kelkfoje eĉ la normala pano mankis. Tiukaze nenio alia restis: La juna Krabato devis ekiri por almoz-peti.

Almozpetado ne plaĉis al la knabo. Li hontis daŭre almozpeti kaj postuli la fornelposton. Sed kion fari – malsata ventro ne havas orelojn! Bravaj homoj ekkompatis al la bedaŭrinda knabo kaj ne promesis al li almozojn, sed ofte avara riĉulo pelis lin el la pordego insultante lin.

3

Tiel do la juna Krabato ofte almozpetante tra la lando vagis. Do okazis iam, ke la vojo gvidis lin al tiu granda, malhela erikejo, kiu etendiĝas inter Hojersverdo, Senftenbergo kaj Bernsdorfo.

Tiu erikejo estis plena de malviglaj fosoj, nigraj flakoj kaj marĉoj kaj malfamaj anguloj, kie la malica akvoviro embuskas en nigra akvo, sovaĝaj noktofantomoj svarmas kaj noktaj vaglumoj dancetas.

Kelkio alia junulo estus eble rezigni eniri tian hantatan terenon, sed Krabato ne estis timulo kaj li ne sentis hororon rigardi al la fantomoj en la okulojn. Li ja volis tro volonte scii, kio kaŝiĝas malantaŭ tiu granda kaj marĉa sovaĝa erikejo. Nu – kaŝiĝis tie malantaŭ tri montetoj la pramalnova vilaĝo Nigra Kolmo, kiu estas antaŭ longe pasintaj tempoj eĉ pli fora ol hodiaŭ.

Kaj klakis tie proksime de la vilaĝo ĉe rivereto malgranda kaj soleca erikeja muelejo. Ne estis tamen muelejo kiel aliaj muelejoj. Tion vi jam ekkonas pri tio, ke la homoj nomis ĝin „Diabla muelejo“. Mastrumis nome en ĝi abomena kaj malĉasta homo, kiu nur damaĝis al homoj. Ne nur per tio, ke li trompis muelgastojn – tion ja ankaŭ aliloke avidaj kaj senskrupulaj muelistoj faris – ne, li krome estis ankoraŭ obsedita sorĉisto kaj magiisto, kiu havis siajn kontaktojn kun malbona spirito.

Li tamen nur ne estis tia malgranda sorĉisto, kiu falĉas fremdan herbon ĉe naŭ limoj aŭ melkas el ŝnureto, sendas la ruĝan leporon en najbarajn stalojn kaj forprenas al mastrinoj la gajnon, fosas al ili „sorĉaĵojn“ sub la sojlo, tiel ke la butero ne sukcesas, la bovinoj donas selakton anstataŭ bona lakto kaj naskas bovidojn, kiu forpelas la nubojn, por ke ne gutu sur ŝtofon, kaj en la Valpurga nokto rajdas sur pigo, balailo aŭ fornoforko al la granda sorĉista renkontiĝo sur la Koŝinmonto.

Ĉiujn tiujn akrobataĵojn memkompreneble ankaŭ la nigrakolma muelisto efektivigis, sed li malmulte okupiĝis pri tiaj bagateloj, ĉar tiuj enspezis al li tro malmulte.

Vi nome devas scii, ke li estis orgojla sorĉisto, kiu alianciĝis kun malbonuloj por trovi vere multe da mono kaj aldone ankoraŭ oro kaj trezoroj kaj aliaj riĉaĵoj, kiujn li akumulis kaj amasigis kiel hamstro la tritikon. Li opiniis, ke oni povus ricevi ĉion por oro kaj antaŭ ĉio potencon, kaj al potenco li ja estis tre avida.

La nigra muelisto havis dek du muelistajn submajstrojn; sed oni devas diri, ke tio verdire ne estis nur muelistaj submajstroj, ĉar ili devis ankaŭ lerni alian okupon krom la muelmetio, nome la sorĉadon. Jes, tiu nigrakolma muelejo estis, por tiel diri, ankoraŭ „nigra lernejo“.

Kompreniĝas, ke tiu nigra muelisto ne instruis siajn lernantojn en ĉio, kion li sciis kaj faris, kiel do, li instruis al ili nur tiajn bagatelojn kaj malgravaĵojn. Li ne volis, ke ili estus tiom ruzegaj kaj sorĉistoj lavitaj per ĉiuj akvoj, kiuj enmiksus sin finfine en liajn aferojn kaj ankoraŭ superus lin.

Ne estis ankaŭ bone, se unu lernis tro diligente kaj kapablis tro multe, ĉar tio apenaŭ valoris la penon. Tia muelista aŭ sorĉista ĉionsciulo nome ne restis longe vivanta. Okazis, ke ĉiujare unu el la muelistaj submajstroj malaperis, kaj tio estis ĉiam la plej lerta. Aŭ li dronis en la mueleja laĝeto aŭ la muelrado kaptis lin en la radejo, aŭ li venis en la bobenojn aŭ li falis teren sub peza sako. La homoj tamen rakontis inter si, ke la nigra muelisto donis per homa vivo imposton al la malbona spirito, al sia donacanto, por liaj servoj...

Al tiu neagrable nigrakolma muelejo ankaŭ vojeraris la juna Krabato. Eble li aŭdis nenion pri ĝia terura mastro? Sed ankaŭ se li estus sciinta tion, li certe ne estus reirinta antaŭ la muelejo. Li ja ne estis timulo kaj li ja ankaŭ estus tro volonte rigardinta tian veran akvomuelejon, ĉar ili alikaze havis nur manmuelilojn en la vilaĝoj.

Al la muelisto-sorĉisto ŝajnis la fremda petisteto, kiu gapis tiom scivoleme en la muelĉambron, esti inteligenta junulo. Kaj ĉar al li ĵus denove la dek dua submajstro trovis malgajan finon, li intencis kapti la vigran junulon kiel novan ler-nanton.

Nu, tio sukcesis pli facile ol li pensis. Al tiu, kiu volas, vi bezonas nur fari signojn per la etfingro! Kaj ion lerni, tion ja la juna Krabato opiniis pli kapabla okupo ol paŝti anserojn kaj anseridojn aŭ postuli la bakfornan imposton irante tra vilaĝoj. Kaj tiel ĉiuj tiuj strangaj bruaj iloj – muelradoj kaj -ŝtonoj kaj muelsakoj –, tio ŝajnis esti al li tre bonega afero. Kaj kiam la muelisto ankoraŭ rikanante rimarkigis: „Vi povas ankoraŭ lerni ion alian utilan ĉe mi krom la metio de muelisto!“, li tre volonte konsentis.

4

Do la juna Krabato fariĝis nun muelista submajstro en la nigrokolma muelejo, kie li devis servuti kune kun siaj dek unu kolegoj, ke la spino krakis, ĉar la muelisto ne malenviis al ili multe da libertempo. Al Krabato tamen la nova laboro faris ĝojon, ĉar li volonte movis sin, kaj ĉar li daŭre povis satmanĝi ĝistede, tiel ke la nova vivo jam antaŭe ne ŝajnis al li esti tiom malbona.

La nigra muelisto ne vane diris, ke oni povas lerni ĉe li ankaŭ ion alian ol la metion de muelisto. Montriĝis baldaŭ, ke li povas pli multe ol manĝi panon, kaj li komencis instrui la junan Krabaton en diversaj sorĉaĵoj, parolturnoj kaj magiaĵoj.

Nu, Krabato iel de antaŭe sentis plezuron ankaŭ en ĉi tiu alia metio. Li ja estis scivolema de infanaĝo kaj volis konatiĝi kun ĉio, kaj tial ankaŭ la sorĉista metio ŝajnis esti al li sufiĉe plezura okupo. Ĉar li rapide ekkomprenis, li volis baldaŭ scii kaj efektiviĝi pli multe ol tiujn sentaŭgaĵojn, kiujn la majstro instruis al ili. Krabato opiniis,

ke sufiĉe da sorĉoj kaj saĝoj ankoraŭ kaŝiĝas en la korakto, tiu malnovega libro kun nigraj paĝoj kaj blanka skribo, en kiun la muelisto ne lasas rigardi nenion.

Tiel pasis monato post monato, fariĝis printempo, somero kaj aŭtuno, kaj Krabato finlernis ĉion, kion la nigra muelisto kapablis aŭ volis instrui al li. Krabato superis per siaj sorĉaj scioj ĉiujn kamaradojn kaj estis la plej lerta inter ili. Nun tamen li pli kaj pli ofte pripensis tion, kion la muelistaj submajstroj rakontis: ke antaŭ la fino de jaro ĉiam unu eli ili mizere pereis. Kiam li pensis pri tio, do kreskis al li graso kaj li timis kaj li donus multe por tio, se li jam estus sufiĉe malproksime de tiu muelejo. Li treege sopiris nun al la hejma paŝtista domo, al la patrino kaj al la patro, kiujn li iam forlasis neadiaŭante.

Li estus volonte fuĝinta de sia mastro, de la sorĉisto-muelisto, sed li bone sciis, ke tiu havas fortojn retenitajn kaj li forlasos lin neniam libervole. Nur per ruzo kaj artifikoj li certe sukcesos superruzi lin kaj venki lin.

Kaj la ruzulo Krabato jam havis ideon. Li petis la majstron lasi lin hejmen por unu tago aŭ du tagoj, por ke li povu viziti la gepatrojn, kiujn li jam ne vidis tiom longe kaj kiuj certe jam tute nenion sciis pri li.

Miraklo, ke la muelisto permesis tion al li! Estis ĝojo kaj jubilo en la Jitka paŝtista domo, kiam la filo ŝajne jam perdiĝinta subite denove ekaperis. La ĝojo tamen baldaŭ malaperis, kiam la gepatroj eksciis, en kian kaptilon la juna Krabato kaptiĝis. Nun la patro furiozis kaj la patrino tordis la manojn kaj finfine ekploris. Nur Krabato ne perdis la kuraĝon, sed klarigis al ili sian intencon, kiel li volas devigi la sorĉiston, por ke li lasu foriri lin.

Kaj nun li klarigis al ili, ke la patrino iru al la sorĉista muelejo kaj elpetu tie sian filon de la muelisto. La sorĉisto gvidos ŝin en malhelan kameron, kie ĉiuj muelistaj submajstroj, metamorfozigitaj al nigraj korvoj, sidos sur stango. Poste la muelisto postulos, ke la

patrino elektu Krabaton el la korvoj kaj se ŝi elektus la ĝustan, tiukaze la sorĉisto devas lasi tuj foriri lin, ĉar kontraŭ la amo de patrino la sorĉisto estas senpotenca.

„Ankaŭ ne estos malfacile diveni ĝuste!“ Krabato diris al la patrino. „Ĉar mi ŝirpinĉos min sub la maldekstraflugilo. Laŭ tio, kara patrino, vi ekkonos min. Poste vi kuraĝe elpetos min kaj la muelisto devas vole-nevole liberigi min. Kaj poste ni kune marŝos gajaj hejmen al Jitko!“

La patrino ĝojis kaj enmemorigis ĉion bone. Post kelkaj tagoj ŝi ekiris al Nigra Kolmo kaj tie ĉio okazis tiel, kiel Krabato antaŭdiris tion.

La muelisto-sorĉisto ĉagreniĝis pro la peto de la patrino, gividis tamen la patrinon en la malhelan kameron, kie dek du nigraj korvoj sidis sur stango.

„Inter tiuj vi havas vian filon“, la muelisto rikanis. „Elserĉu la ĝustan!“

Sed en tiu momento unu el la birdoj ŝirpinĉis sub la maldekstraflugilo. „Donu al mi tiun!“ la patrino montris al li kaj estis tio Krabato kaj la sorĉisto devis lasi foriri lin el sia deĵoro dentogrin-cante. Krabato revenis gaja hejmen kun la patrino. Kaj li ankoraŭ kunportis la sorĉistan libron, la korakto, kiun li kaŝe forprenis de la majstro.

5

En la Jitka paŝtista domo nenio ŝanĝiĝis. Malsato kaj mizero rezistis tiel kiel antaŭe. Sed nun Krabato ne plu volis toleri ĉion kaj magre vivi kaj kontente leki tiun nigran farunon kaj rodi sekan panon. En la nigrokolma muelejo li ja kelkion lernis kaj kion la nigra muelisto ne instruis, Krabato lernigis al si mem el la sorĉolibroj, kiujn li forprenis de sia majstro. Li do havis nun la potencon helpi al si kaj siaj familianoj. Kaj la saĝa Krabato diris al la patro:

„Aŭskultu, patro, tio ne plaĉas al mi! Aliaj plen- kaj tromanĝas kaj ni devas

daŭre suferi malsaton. Mi ne volas rigardi tion pli longe. Mi ja lernis kelkion tie en tiu nigrakolma muelejo. Ĉu vi scias? Mi metamorfozos min al dika virbovo, poste vi povas vendi min por multege da mono al negocistoj pri bruto el Vitijenaŭo aŭ Kamenco, al tiuj teruraj sangosuĉantoj. Nu, ne ektimu, mi ne lasas buĉi min kaj mi ankaŭ ne volas resti virbovo por ĉiam! Mi jam fuĝos for de ili kaj revenos al vi kiel via filo Krabato. Por tio tamen estas necese, ke vi ne kunvendas la kolbridon, alikaze mi ne povus liberigi min de la virbovo kaj refariĝi homo.“

La patro ektimis pro tiaj kuraĝaj vortoj kaj ankaŭ poste, kiam li iel kolektis siajn fortojn, tiuj aĵoj ne volis al li en la kapon. Li ja estis brava kaj humila bonulo, unu el tiuj servutuloj, kiuj daŭre lasis opinii sin subpremanto kaj eĉ ne pensis pri tio ankaŭ iam helpi al si mem. Memkompreneble tiuj ĉi negocis-toj pri bruto el Vitijenaŭo kaj Kamenco kutimis esti teruraj impertinentuloj, tiaj ekspluatantoj kaj sango-suĉantoj, kiuj trompis malriĉajn kamparanojn kaj ruze senfeligante ilin, kie ajn ili povis, ke kreskis al ili el tiuj trompaĵoj pendantaj dikventroj. Sed forpreni de tiuj trompantoj parton de iliaj friponitaj havaĵoj – ne, pri tio la duonpatro de Krabato ne kuraĝis eĉ pensi.

Nu – la Jitka paŝtisto ankaŭ ne havis tempon detale esplori la aferon, ĉar Krabato subite malaperis kaj malantaŭ la fenestro grasigita bovuko eklekis, tia ega, kornohava koloso, kiun la patro ankoraŭ ne vidis dum sia vivo.

La Jitka paŝtisto ja ankoraŭ eksciis, ke malantaŭ la vokanta haŭto kaŝiĝis lia duonfilo. Li ankoraŭ hezitis iomete, sed poste li aŭskultis al la postulanta blekado de la bovuko, ĝemis kaj prenis la kolbridon en la manon por gvidi la Krabatan bovukon al la brutfoiro de Vitijenaŭo.

La neĉiutage graso bovuko sur la foiro de Vitijenaŭo vekis ne malmulte da atentemo. La negocistoj el Vitijenaŭo kaj Kamenco kunkuris ĉirkaŭ la grasigita bruto kaj batalis pri ĝi. Finfine dikega Kamencano aĉetis la bovukon

superatutinte ĉiujn kaj pagis por ĝi sufiĉe da dikaj taleroj. La duonpatro de Krabato, ŝovinte la monon en la poŝon rapidegis hejmen preninte la kolbridon. Ankaŭ la negocisto el Kamenco iris hejmen. Ĝojis pri tio, ke li denove sukcesis superruzi soraban vilaĝanon kaj li elkalkulis, kiom do li profitus en Kamenco el tiu graso bovuko.

Intertempe li survoje alvenis al Jitro kaj tie ĉestrata gastejo ja forte allogis lin.

„Pro tiu bona aĉeto vi povas permesi al vi glaseton“, li diris al si kaj eniris ankaŭ senhezite, kaj ĉar li trovis kelkajn malnovajn kamaradojn en la gastejo, ili do baldaŭ vetlevis pokalon. La bovukon li gvidigis en la stalon, kaj por ke ĝi ne timu tie, li ordonis al la filino, ke ŝi donu al la kornobruoto iom da fojno.

Krabato tamen jam estis tedita de la bovuka vivo, kaj kiam la filino eniras la stalon kun fasko da fojno, Krabato ekgrumblis al ŝi per homa voĉo:

„Vian fojnaĉon mi ne ŝatas. Alportu al mi prefere ĝuste grasan rostitan porkaĵon kun buloj kaj acida brasiko!“

Vi do povas imagi, ke la knabino lasis fali la fojnon kaj preskaŭ falis teren pro teruro: Parolantan virbovon ŝi ankoraŭ ne renkontis. Ŝi ŝanceliĝis en la ĉambron kaj balbutis al la jam iel nebulitaj drinkuloj mesaĝon pri frandema, parolanta virbovo.

Tiuj komence mokridis pri ŝi, poste tamen ili iris kun ŝi en la stalon por konvinkiĝi per propraj oreloj pri tiu miraklo. Sed tie jam ne estis virbovo, nur eta hirundo ŝvebis super iliaj kapoj el la stalo. Tio ja estis nia Krabato, kiu intertempe metamorfozis sin al birdo kaj nun rapidis gaja hejmen al Jitko, kie li jam alflugis, antaŭ ol la patro revenis de la foiro el Vitijenaŭo.

6

En la Jitka paŝtista domo ili nune tre bone fartis. Per la akirita mono ili aĉetis al si manĝaĵojn kaj tiel ili povis finfine satmanĝi ĝistede post multaj jaroj de mizerado kaj ĉiutage ili rostis,

por tiel diri, lardon per butero. Kaj super viando kaj kolbasoj ili volonte forgesis brasikon kaj brasikan buljonon.

Sed iom post iom la akirita mono elĉerpiĝis kaj per tio la mizero revenis en la domon.

Tiu memkompreneble venis nun sufiĉe maloportune al ili, ĉar ili ja mallernis malsatadon kaj mizeradon. Krabato tamen sciis eliron:

„Ni ne plu suferos malsaton. Mono devas denove en la domon! Ĉifoje mi transformiĝos al belega ĉevalo kaj la patro gvidu min al la ĉevalfoiro de Vitiĵenaŭo por alpendigi min tie al iu trompema negocisto pri ĉevaloj. Tio alportos al ni denove amason da oraj koketoj kaj poste ni povas denove havi ĉion en abundo kaj festeni. Nur, patro, pro Dio ne kunvenu la bridon, alikaze vi malfeliĉigos min kaj mi ne povos reveni al vi kiel via filo Krabato!“

La patrino ektimis kaj malkonsilis, sed Krabato kaj la patro havis surdajn orelojn: Ili volis denove bonajn manĝaĵojn. Tiel ne daŭris longe, ĝis kiam Krabato kiel fajra rufa ĉevalo dancetis antaŭ la domo. La patro sidigis sin sur ĝi kaj forrajdis kun ĝi al Vitiĵenaŭo.

Sur la ĉevalfoiro de Vitiĵenaŭo oni rigardis per larĝe malfermitaj okuloj al la belega ĉevalo kaj la negocistoj amasiĝis ĉirkaŭ ĝi kiel muŝoj ĉirkaŭ la miel-poto. Kompreneble ili rapide eltiris la monujon por ricevi tiun fieran rufan ĉevalon.

Plej forte do altrudis sin iu fremda ruĝharulo, kiu estis sintrudulo kaj ŝajne bonstata, kaj li finfine ankaŭ aĉetis la ĉevalon por imense multe da mono.

La patro de Krabato, havante la postulon de sia duonfilo en la memoro, volis nun malsuprentiri la bridon de la ĉevalo, sed la negocisto, flankeniginte lin, jam saltis sur la ĉevalon kaj forrajdis rapide. La Krabat-ĉevalo tuj ekkonis, kiun ĝi ricevis kiel rajdanton sur la dorson: Tio ja estis tiu malbonega Nigrakolma muelisto! Tiu terure ĉagreniĝis, ke li devis lasi foriri sian plej bonan lernanton, kiun li volis oferi al la malbona spirito kaj furioziĝis eĉ pli

mul-te rimarkinte, ke Krabato forprenis la sorĉolibrojn de li. Longe li sentis sekre-tan koleron kaj planis venĝon. Kiam li aŭdis la mesaĝon pri tiu stranga virbo-vo en la gastejo de Jitro, verŝajne pen-so tuj rakontis al li, kiu kaŝiĝis ĉi tie malantaŭ tiu virbova haŭto.

Nun prezentiĝis al li la ŝanco, kiun li volis plene uzi: Li kaptis Krabaton!

La terura rajdanto bategis la kompatindan Krabaton pere de vipo kaj pikis lin per sprono, ĝis kiam la sango tiel torrente fluis. Li ne ĉesis, sed pelis la ĉevalon senkompate trakampe, ke la turmentita Krabato traŝvitita perdis la spiron kaj terure anhelis.

La nigra muelisto elpensis por li eĉ pli grandan torturon.

Antaŭ forĝejo meze de la erikejo li haltis kaj ordonis al la forĝisto, ke li tuj kaj surloke alnajlu al la juna bruto kvar hufojn – sed ardantajn. La forĝisto ektimis pro tia kruela postulo kaj tuj sentis intuicie, ke ĉi tie io ne estas en ordo.

Li volonte elŝteliĝus kaj li do petis la fremdulon, ke li eniru la forĝejon por mem elekti la hufojn tie.

La forĝisto havis metilernanton, al kiu li ordonis teni la ĉevalon kaj kiam tiu karesis la senspiran ĉevalon tiom kompateme, tiu subite flustris al li per homa voĉo:

„Ho, mi petas vin, tiru al mi rapide la bridon super la maldekstran oreleon!“

La metilernanto do estis sufiĉe surprizita, sed estis al li kvazaŭ li devus obei la ĉevalon kaj trenis al li la bridon malsupren. Kaj ĉi tie la ĉevalo subite malaperis sub liaj manoj kaj samtempe ŝvebis iu eta alaŭdo super li al la ĉielo.

Kiam la muelisto-sorĉisto, reveninte el la forĝejo, ne plu trovis la Krabaton-ĉevalon, sed anstataŭ tio ekrigardis trilantan birdon en la ĉielo, li do tuj divenis, kio ĉi tie okazis kaj kia birdo tio estas tie.

„Gardu vin, bubaĉo, mi ankoraŭ kaptos vin!“ li grincis kaj jam transformiĝis en nizon kaj ĉasis la alaŭdon. Nu – tia rabobirdo kutime estas pli rapida ol eta trilulo kaj certe li estus baldaŭ atinginta

kaj kaptinta ĝin kaj Krabato estus perdinta, se tiu inteligentulo ne estus lasinta fali sin teren rapide kiel ŝtono, kaj tio rekte en puton, kie li tuj, transformiĝinte en fiŝon, freŝa kaj vigla naĝis tra la akvo.

La Krabat-fiŝo nun opiniis, ke ĝia malamiko perdis la spuron kaj pensis pri tio, kiel ĝi elvenas el tiu profunda puto. Kaj vidu, tie knabino venis por preni akvon pere de sitelo. La Krabat-fiŝo ŝovis sin volviĝante en la sitelon kaj en la sitelo li transformiĝis en oran ringon.

La knabino ne malmulte miris, kiam ŝi tie en la sitelo rimarkis tian brilajon kaj tio estis trembrilanta, altvalora ringo, kaj tiun ŝi gaja ŝovis sur sian fingron. Tiu bonega ringo ege plaĉis al la knabino kaj ŝi tre ĝojis pri ĝi.

Sed aperis ĉi tie subite iu fremda, ruĝhara viro kaj proponis al ŝi monujon da ormoneroj kaj eĉ pli multe por tiu ringo, sed ŝi obstine rifuzis vendi ĝin al li. Vi certe jam divenis, ke tio denove estis tiu malbona Nigrakolma muelisto, kiu ankoraŭ tute ne lasis fali la esperon, ke li tamen enkaptos sian iaman metilernanton por fari venĝon al li. Kaj ankaŭ ĉifoje li malsukcesis!

La knabino portis la akvon en la domon kaj revenis en la korton por manĝigi la kokojn. Kaj dum tio la ringo ŝoviĝis al ŝi de la fingro, ĉar Krabato enuis kaj transformiĝis en avengrajneton. Sed tuj estis ankaŭ denove la sorĉisto ĉi tie, kiu intertempe ŝteliris ĉirkaŭ la bieno embuskante Krabaton.

Transformiĝante en virkokon, li komencis rapide piki avengrajnetojn esperante, ke li ankaŭ glutos Krabaton.

Nun tamen Krabato perdis la paciencon. Tedis lin lasi sin daŭre ĉasi kaj perse-kuti de la muelisto. Li decidis finigi al la malamiko kaj liberigi sin de li por ĉiam. Tial li transformiĝis kiel fulmo en vulpon, ĵetis sin sur la sorĉiston-virkokon, kaptis lin kaj tramordis lian kolon.

Tiamaniere la nigrakolma muelisto-sorĉisto, kiu faris tiom da krimoj kaj turmentis bonajn homojn kaj damaĝis

ilin, havis malgajan finon, kaj Krabato kaj ĉiuj bravaj homoj ĉirkaŭe havis nun pacon kaj trankvilon kaj ĝojis kaj jubilis imense.

7

Tiamaniere Krabato eskapis el la granda danĝero, kaj ĉar lia terura kontraŭulo estis neniigita, li povis trankvile ĝui sian vivon. Li denove akiris sufiĉe da mono, ke li povis longe vivi sen zorgoj kun siaj gepatroj. Dum tio ili tamen ankaŭ ne maldiligentis, sed paŝtis plu. Ankaŭ Krabato iris nun kun grego da porkoj al la paŝtejo. Kaj ankaŭ ne estis enue al li dum tio, ĉar li mallongigis al si la longan tempon pere de diversaj sorĉaĵoj kaj magiaĵoj. Tiel li foje amuziĝis per tio, ke li ordonis al la porkoj, ke ili starigu sin en vico kaj dancu sur la postkruroj. Kaj al tio Krabato ludis al ili gajajn sorabajn muzikaĵojn per la tarakavo. Ĵus tiutempe tamen belaspekta kovrita ĉaro veturis laŭ la strato, tia treege orumita, nobla kaleŝo kun ses blankaj ĉevaloj kaj kun belaspekte vestita sinjora koĉero sur benko, kun kunkaleŝistoj, servistoj kaj kun antaŭrajdanto kaj kun aro da grandsinjoraj rajdantoj ĉirkaŭe, tiaj pucaj, velurvestitaj, trembrilantaj kaj galonitaj lakeoj kun longaj perukoj – neniam antaŭe Krabato vidis tiajn ridinde pucajn homojn.

Kaj en tiu impona kaleŝo sidis iu korpulenta sinjoro en treege belaspekta, orbrodita vestaĵo, tio ja estis la saksa reĝo Aŭgusto la Forta mem, kiu, estinte en Pollando, revenis al Dresden pro iuj diboĉaĵoj.

La reĝo jam vidis kelkajn aĵojn dum siaj vojaĝoj kaj jam trovis strangajn objektojn, ale dancantajn porkojn li ankoraŭ trovis nenie, ne mirige, ke li ordonis tuj halti, por ke li povu rigardi tiun spektaklon pli detale.

Kaj la reĝo opiniis, ke la junulo, kiu lernigis la dancadon al la porkoj, verŝajne ankoraŭ faras aliajn akrobataĵojn, kaj tial li tuj kunprenis lin,

senhezite, al Dresden. Kompreniĝas, la reĝo estas potenca viro, li demandas neniun, ĉu tiu volas aŭ ne volas, do li ankaŭ senprokraste prenis Krabaton ĉe la kolo, metis lin en la kaleŝon kaj forveturis kun li – hej marŝ – al Dresden.

La patro povis poste mem serĉi la porkojn kaj rompi al si la kapon, kio do okazis al lia duonfilo.

En Dresden la reĝo ne sciis, kion li nun propradire faru kun sia survoje kolektita soraba porkopaŝtisto – li verŝajne jam intencis aliajn aferojn. Li do donis Krabaton en la kuirejon, por ke li intertempe tie servu al la kortega kuirejmajstro, portu akvon al li, elprenu viscerojn el kokoj, tranĉu cepojn kaj ajlon, raspu krenon, purigu potojn kaj patojn kaj transprenu similan tedan laboron, kiun la sinjoraj kaj reĝaj kuiristoj mem ne ŝatas fari.

Memkompreneble Krabato ne bezonis morti pro malsato ĉe tio, ĉar li profitis de diversaj frandaĵoj, sed mielfrandado ankaŭ tiu laboro ne estis. La reĝa kuirejmajstro nome estis tia maljuna grumblulo, tia vere malica grumblulo, kiu ne ŝatis la vilaĝan junulon, vango-frapis lin ofte senmotive aŭ tiris lin ĉe la haroj aŭ turmentis lin kiel ajn.

Tio ja nun kolerigis Krabaton sufiĉe multe, kaj li pensis pri tio, kiel li povus venĝi sin al li pro tio okaze.

La okazo baldaŭ prezentiĝis.

Denove la reĝo invitis multajn distingitajn sinjorojn kaj sinjorinojn al granda festeno kaj la kuirejmajstro embarasiĝis per la preparoj. Li devis prepari rostitajn koketojn kun nudeloj, kiujn la reĝo treege volonte manĝis.

La kuirejmajstro tiun tagon denove estis grumblema kiel malnova ŝuo, do estis por Krabato sufiĉe da vangofrapoj.

„Nun tio sufiĉas al mi“, Krabato koleris. „Mi ne plu lasas trakti min kiel maton de tiu kruda grumblulo. Mi montros al li, kiu estas la mastro!“

Nu, li ankaŭ montris tion al li! Kiamaniere, vi tuj ekscios.

La rostitaj koketoj sukcesis, laŭ opinio de la kuirejmajstro, tre bone, kaj ankaŭ la nudeloj estis neriproĉeblaj. La korte-

gaj servistoj fiere alportis la frandaĵojn en vualitaj arĝentaj ujoj en la reĝan manĝoŝalonon. Al ĉiuj tiuj noblaj gesinjoroj la salivo venis en la buŝon pro tiu bona manĝaĵo, kiu jam de malproksime tiom bonege odoris.

Ili levis la kovrilojn. Pro dio kaj damne – kio tie okazis? Anstataŭ la rostitaj koketoj tie rampis teruraj vivaj ranoj kaj anstataŭ la grasaj nudeloj tie tervermoj serpentumis. La noblaj kaj delikataj sinjorinoj hororis kaj ankaŭ la sinjoroj, kaj eĉ la generaloj ĝismorte ektimis kaj vomemis.

La fortan reĝon tiu afero ege ĝenis. Malpuraj ranoj kaj tervermoj sur la reĝa tablo – tio estas al li ja kruda, estis ridindigo de kaj mokado pri la reĝa moŝto. La reĝo furiozis. Ili tuj devis treni la kuirejmajstron al li. Tiu lamentante pri indulgo ĵuris, ke li estus senkulpa, tio tamen tute ne helpis al li: El la malliberejo li ne eskapis.

Certe vi jam divenis, kiu faris tiun petolaĵon kaj transformis la rostitajn koketojn en terurajn ranojn kaj la nudelojn en naŭzajn tervermojn. Memkompreneble nia Krabato faris tion, kaj tio finfine ankaŭ montriĝis. Kaj la reĝo ne volis ekkvereli kun tia danĝera ulo kaj sendis Krabaton senprokraste hejmen. Kaj kun tio tiu ankaŭ estis tute kontenta.

8

Krabato eklernis la paŝtistadon, li ja estadis en la fremdlando, eĉ en Dresdeno en la reĝa kastelo, tial nun la hejma Jitko ŝajnis al li tro malvasta nesto. Li decidis iri al lontano. Li ja ankaŭ iel lernis la muelistan metion tie en Nigra Kolmo. Nun li vagis kiel migranta muelisto tra la lando de muelejo al muelejo por labori tie aŭ alie, postulis donacojn ĉe muelistoj kaj konatiĝis dum tio kun landoj kaj homoj.

Liajn sorĉistajn kapablojn li povis ofte bezoni kaj apliki bone dum tio, kaj la muelistoj ofte ankaŭ sentis tion per sia haŭto. Kie ili bonvenigis lin kun dona-

cema mano, tie ili ne bezonis bedaŭrition; li rekompencis ilin malavare. Kie la muelejaj aloj pro la manko de aero ne volis turniĝi, tie Krabato faris al la brava muelisto venton, al la avara tamen li sendis ŝtormon por ke tiu renversu la tutan ventmuelejon, tion li meritis! Al grumblema muelisto li forprenis la lastan guton de akvo, tiel ke en la muelĉambro estis trankvilo kiel dum la konfeso, sed al bonkora majstro li inverse donis sufiĉe da akvo, kiam tiu devis paŭzi dum semajnoj pro granda sekeco.

Tiel Krabato migris tra la lando, punis la avarajn, maldiligentajn, malicajn kaj maldecajn homojn, traktis ilin malbone kaj mistifikis ilin, bravajn, malavarajn kaj diligentajn homojn tamen li rekompencis kaj preferis ilin kaj helpis al ili, kie li povis.

Baldaŭ oni rakontis kaj portis la novaĵojn pri la akrobataĵoj kaj petolaĵoj de la bona sorĉisto Krabato en la tuta lando. La malriĉaj, tretataj kaj humiligataj homoj ĝojis kaj gloris Krabaton, la avaraj kaj malbonaj homoj, la riĉuloj kaj ekspluatantoj tamen komencis timi lin.

9

Tiel Krabato vagadis kiel migranta muelisto tra la lando, tra la Baŭcena, Kotbusa kaj Misena regionoj, kaj li certe estus ankoraŭ migranta sufiĉe longe, se ne io estus okazinta, kio sufiĉe ŝanĝis lian vivon. Dum tiu tempo nome la imperiestro ĵus militiris kontraŭ la turkoj pro Hungario, kiun ili ne volis lasi el siaj ungegoj. La saksa reĝo havis tiutempe pakton kune kun la imperiestro kaj devis helpi al li kontraŭ la turkoj. Por tio li kompreneble bezonis soldatojn, kiuj riskus sian vivon. La reĝo do ordonis al siaj kaporaloj-varbistoj elrigardi al novaj soldatoj, tiaj fortaj, imponaj uloj, kiuj povus egaliĝi al la turkoj kaj rekruti ilin per ruzo kaj per perforto.

La reĝaj varbistoj ekrimarkis ankaŭ Krabaton, nu – li estis impona, granda

junulo – kaj Krabato kaptiĝis en ilia kaptilo kaj tiel okzis, ke li denove devis al Dresdeno, ĉi-foje ne kiel kuireja knabo en la reĝan kuirejon, sed kiel soldata novulo en la kazernon.

Krabato nun devis lerni pafi kaj batali per glavo, kiel ĉiuj aliaj liaj kamaradoj, antaŭ ĉio tamen ekzerci, marŝi kaj obei, kaj dum tio oni batis per bastono sur dorson, kiel tio tiutempe estis kutima ĉe soldatoj.

Post kelkaj monatoj li lernis tiom multe, ke oni sendis lin kiel kapablan batalanton por la reĝo al Hungario kontraŭ la turkoj. Reĝo Aŭgusto, kiu tre estimis honoron, rajtis estri la imperiestran armeon. Kaj tio ne estis bona! Reĝo Aŭgusto, tio ja estas konata, estis toksikomaniulo, li rompis hufferojn per la mano kvazaŭ ili estus brecoj kaj tenis plenkreskan tromboniston per etendiĝinta brako, sed pri la militmetio li ne estis sperta. Tial li ankaŭ malvenkis kun malgloro kaj malhonoro. Eĉ pli malbone estis, ke la turkoj kaptis lin mem dum tio kaj forkondukis lin en malliberecon.

Ho, ve! La armeo nun estis sen estro kaj Saksio sen reĝo. Kion fari? La generaloj kaj ĉiuj oficiroj perdis la kuraĝon, vagante kiel mizeruloj, ili interkonsiliĝis kaj faris planojn: Kion nur fari?

Ili enpensiĝis, pripensis, konsideris... Finfine unu el la koloneloj havis ideon:

„Aŭskultu do! Mi ĵus rememoris, ke mi havas en mia regimento tian soraban altkreskulon, iun porkopaŝtiston aŭ migrulon, li nomiĝas Dravato aŭ Krabato aŭ simile. Tiu kapablas, laŭdire, pli multe ol manĝi panon – nu, li estas tia sorĉisto, propre ni devus brulmortigi lin! Do, tiu Dravato laŭdire kapablas transformiĝi en ĉevalon aŭ virbovon kaj tian bruton – li iam trompis per tio komercistojn kaj ankaŭ en la reĝa kuirejo li faris tiajn impertinentaĵojn. Do mi pensas, ke tiu damnita soraba sorĉisto eble povus helpi al nia bona reĝo el tiu embaraso, volis diri kapti-teco, eksteren. Do, kion vi pensas pri tio?“

Nu, la generaloj kaj aliaj oficiroj havis diferencajn opiniojn, sed ĉar ili ne

havis pli saĝan ideon, ili finfine konsentis, ke oni provu tion kun tiu soraba sorĉisto. Ili vokis la soldaton Krabaton kaj ordonis al li, ke li tuj iru al la turkoj kaj, postlasinte ĉion, kaj liberigu la reĝon-komandanton el la mallibereco kaj alportu lin ĉi tien. Kiel, tio estas lia afero! Li ja estas la sorĉisto!

Krabato ne timis tiun taskon eĉ iomete, li nur diris „Laŭ ordono!“ kaj petis pri bona ĉevalo. Tian ili kondukis al li, Krabato saltis sur ĝin kaj jam – huj – li forrajdis fulmrapide sur ĝi kvazaŭ la malbono sekvus lin.

Komence Krabato rajdis laŭvoje, poste tamen li hastis zigzage kaj finfine – aŭskultu – li leviĝis aeren kaj jam supre en la ĉielo inter la nuboj li flugis pli rapide ol hirundo. Dum tia flugo Kraba-to estis – memkompreneble – baldaŭ super la turkoj. Malsupre la tendoj de la turka tendaro elŝeliĝis kaj inter ili svarmis de soldatoj. Krabato nun klopodis iel nerimarkite surteriĝi malantaŭ la tendaro. Kaj li ankaŭ sukcesis.

Al sia ĉevaleto Krabato donis nutraĵon kaj kaŝiris en la turkan tendaron, memkompreneble ne en sia vera homa figuro kaj ankaŭ ne en la ruĝa uniformo de saksa infanteriano, kiel do tio – tiukaze la turkoj ja tuj dishakus lin en pecojn. Ne, li transformiĝis en hundon. Tian bojantan hundon oni ne plu atentis tie en la tendaro.

Iom post iom li elflaris la tendon, en kiu la turkoj kaŝis kaj gardis sian reĝan kaptiton. Tia malgranda hundo ĉie vagabondas, li ankaŭ ŝoviĝis preter barba, terura gardisto en la tendon, en kiu la reĝo, perdinte la kuraĝon, havis timon kaj faris planojn, kiel li povus eskapi el tiu malfeliĉo, sed ideon li ne havis.

Enŝteliĝinte en la tendon, Krabato ne hezitis retransformiĝi el hundeto en homon. Jen vi povas pensi, ke la kaptita reĝo estis sufiĉe surprizita, kiam tie saksa musketisto ekaperis kiel el la neniaĵo.

La musketisto ne lasis ekparoli lin, sed flustris:

„Sinjoro reĝo, silentu! Ni povas interparoli pli poste. Nun ni devas zorgi, ke ni devas rapidi kiel vento por savi sin de la damnitaj turkoj. Tenu vin je baskoj de mia mantelo! Pri ĉio alia mi zorgos. Do, rapidu ni!“

Nu, la reĝo tenis la buŝon fermita, prenis la baskon de sia soldato, kaj tiu jam – huj – tuj flugis kun li el la tendo, ke por ili ambaŭ ĉiuj kurtenoj kaj tapiŝoj flirtis kaj la barba gardisto dorsdirekte falis teren.

Nun estiĝis granda bruoj kaj kriado en la turka tendaro, kiam la saksa reĝo fuĝis je la basko de sia soldato tra la aero el la mallibereco. La turka komandanto, tiu grandveziro, ŝiris en granda ĉagreno sian nigran barbon, poste tamen rememoris, ke li ja ankaŭ havas sorĉiston inter siaj janiĉaroj, tian turkiĝinton, kiu transkuris de la saksoj al la turkoj antaŭ jaroj. La sorĉisto-dizertinto ricevis la ordonon, ke li tuj ekiru por la saksa reĝo kaj reportu lin en la tendaron viva aŭ morta. Soldato devas obei, kvankam li estas sorĉisto! La turkiĝinto transformiĝis en nigran aglon, tian teruran kaptobirdon kaj estis baldaŭ sur la spuroj de la fuĝintoj.

La reĝon timo atakis, kiam la nigra birdegaĉo atakis lin per siaj ungegoj. Krabato tamen sciis kion fari: Murmuris sian sorĉan parolon kaj jam amasiĝis malantaŭ ili densa nebulo, tra kiu la persekutanto ne plu povis vidi ilin. Sed tio helpis nur provizore. La turkiĝinto estis treege ruza sorĉisto kaj baldaŭ li venkis la nebulon kaj akriĝis denove siajn ungegojn por la reĝo, ke al tiu ĉiuj membroj tremis pro timo.

„Ni ne lasas timigi nin!“ trankviligis lin Krabato, murmuris denove sian parolon kaj jam ĉi tie treege alta muro kreskis inter fuĝintoj kaj ilia persekutanto.

La nigra birdo tamen subigis ankaŭ tiun obstaklon.

„Tio ne plaĉas al mi“, Krabato diris, „nun mi devas apliki nebelan rimedon. Sed mizero pravigon ne bezonas!“

Kaj li petis la reĝon, ke li ŝiru sian oran manumbutonon de la mantelo kaj per tiu manumbutono Krabato ŝargis sian

pafilon kaj alŝultrigis ĝin kaj nerigar-dinte malantaŭen li ekpafis. Nu, li ne maltrafis: Ekkrio malantaŭ li malkaŝis al ili, ke ili liberiĝis de la persekutinto.

Sed la ekkrio ankoraŭ malkaŝis ion alian al Krabato: Li ekkonis en ĝi la konatan voĉon de kamarado, de bona amiko, kun kiu li tiutempe servutis en la nigrakolma muelejo por la muelistomagiisto kaj ĉe tiu lernis la metion de sorĉisto. Nun Krabato tre bedaŭris, ke li devis mortigi sian amikon en la servo de la reĝo kaj li suspiris:

„Tiel tio ĉiam estas: La granduloj tanas la haŭton al si kaj la popolo devas riski sian vivon por ilia bono. Kaj amikoj devas mortigi unu la alian pro la aventuroj kaj stultaĵoj de reĝoj kaj potenculoj!“

Kaj Krabato revenis kun la reĝo je la basko en la saksan tendaron. La reĝo ĝojis, sed Krabato funebris pri sia mortinta amiko.

10

Propre la reĝo povus nun esti gaja, ke la aventuro finiĝis bone kaj li mem sana kaj vigla revenis el turka mallibereco. Li povus esti pli atentema. La gratito ja kutime gardas sin kontraŭ la dorno. Sed ne, la reĝo ne prudentiĝis! Li intencis denove iri al la turka tendaro. Kion ĝenas? Li ja havis tian bonan soldaton-sorĉiston, kiu certe portos lin tien kaj ankaŭ denove portos reen! Eble li sukcesos en la tendaro spioni sekretajn militajn planojn kaj intencojn de la turkoj? Hej, tio estus treege konvena al li! Eble poste finfine sukcesos venki la turkojn kaj fini la militon per tio?

Ili ordonis al Krabato, ke li tuj reiru kun la reĝo al la turka tendaro. Soldato obeu, kvankam li estas sorĉisto! Krabato elpensis novan sorĉaĵon. „La turkoj jam estos prudentaj“. li diris, „ili atentos kaj observos la ĉielon – tial ni ne povos denove montri nin en nia vera figuro en la aero!“

Tamen! Li ŝanĝis sin kaj la reĝon en du malgrandajn muŝojn, kiuj zumis

gajaj en la turkan tendaron. Daŭris tio certe iomete pli longe, sed por tio ili alvenis pli sekure. Survoje Krabato ankoraŭ donis instrukciojn al la reĝo:

Tiel longe kiel ni estos muŝoj, nenio povas okazi al ni. Tiaj muŝoj estas pli ol sufiĉe tie en la tendaro, al tiuj neniu atribuas atenton! Sed ni devas eviti arĝenton! Tuj kiam ni tuŝas arĝentan objekton, ni estos reŝanĝataj en homojn. Kaj tiam povas fariĝi malbone!“

Nu, la reĝo promesis eviti ĉian arĝentan.

En la tendaro ili havis feliĉon: La turkaj oficiroj estis ĵus renkontiĝintaj en la tendo de la grandveziro por interkonsiliĝoj, kaŭris super mapoj kaj interkonsiliĝis, kiel ili plej bone kaj plej lerte povus venki la germanan imperiestron kaj liajn helpantojn.

Krabato kaj la reĝo baldaŭ eltrovis la tendon de la komandanto kaj partoprenis entuzasme kiel muŝoj en la interkonsiliĝo. La plej entuziasma kaj plej scivolema memkompreneble estis la reĝo kaj dum tio trudema kiel skabio: Li daŭre turniĝis sur la mapo inter la fingroj kaj krajonoj de la turkaj oficiroj por ekscii kaj rekognoski sufiĉe multe. Ne mirige, ke tiuj turkoj finfine ĉagreniĝis pro tiu damna kuraĝa muŝeto kaj la grandveziro mem provis kapti ĝin por dispremi ĝin. Nu, nun la reĝo ne havis tempon por foriĝi. Li fuĝis, sed dum tio li iomete perdis la vojon aŭ – koncize, li puŝis arĝentan kulereton, kiu tie kuŝis sur tablo. Kio nun sekvis, vi povas imagi: La reĝo kaj kun li ankaŭ Krabato tuj transformiĝis en homojn. La turkoj gapante rigardis, kiam tie subite la ore brodita reĝo kaj kun li saksa soldato staris. Antaŭ ol ili tamen ripozis, Krabato jam rapidis kun la reĝo el la tendo.

Nun tamen ĉiuj turkoj rapidis post ili. La plej rapida estis unu el la turkaj soldatoj; tiu daŭre estis sur iliaj spuroj. De tiu Krabato volonte liberiĝus, sed denove mortigi homon, tion li ne volis. Sed li havis ideon: Li havis feran ringon kun si, tiun li ĵetis super la kapon de la turka soldato, kaj tiu ringo

ŝoviĝis al li tra la ŝultroj ĝis la kruroj kaj firmtiris sin tie kaj katenis la soldaton, tiel ke li falis. Nun li povis voki la seruriston por hel-po, por ke li dissegu al li la ringon.

Krabato estis intertempe fuĝinta kun la reĝo.

Nesukcesinte ili tamen ne volis reveni. Tial Krabato transformis sin kaj la reĝon en nizojn kaj ili ŝvebis tiom longe super la turkoj kaj la reĝo skrupule ĉirkaŭrigardis kaj enmemorigis la starpunkto de la turka armeo kaj reveninte al siaj li tuj starigis la soldatojn por batalo kaj ili atakis la turkojn kaj venkis memkompreneble ilin. Ili devas danki tion nur al la soraba musketisto kaj sorĉisto Krabato.

La turkoj jam ne ripozis de la battoj kaj petis pri paco. Kaj tiel la milito finiĝis kaj la soldatoj marŝis gajaj hejmen kaj estis tre feliĉaj.

11

Reĝoj kaj princoj kutime estas nedankemaj. Ili pensas, ke estas memkomprenebleco de la vulgara popolo servi al ili kaj ke ili ne meritas apartan dankon kaj salajron por tio. Ni do ne tre mirus, se la saksa reĝo hejmensendus sian helpanton kun malplenaj manoj, kvankam li cetere estas disipulo kaj diboĉulo. Sed eble la reĝo estis en tiu tago aparte bona kaj gaja aŭ kio ajn – koncize, plaĉis al li montri sin nobla, kompatema kaj grand-anima kaj sekve li intencis rekompenci sian bonan soldaton, kiu savis lin dufoje el la turkaj ungegoj kaj helpis al li gajni la militon.

Li povus doni al li monon, sed de tiu la reĝo mem nun havis malmulte post la milito. Li povus nomumi lin ĉambristo aŭ ministro aŭ tia simila kortegano, sed li pensis, ke soraba vilaĝano ne bone taŭgus por tio.

„Sed kio do“, li finfine diris al si, „mi donos al li iun kastelon aŭ kavaliran bienon, mi ja havas tiom multe de ili, ke eĉ mi ne konas ĉiujn bone.

Sed kion tia vilaĝa malgraciulo faru per granda kastelo aŭ kavalira bieno? Mi donos al li tiun izole situantan bienon en Zĝiro, tio ja estas nenio krom sabla kaj marĉa grundoj kaj iomete da mizera erikejo, multe mi ne perdos per tiu anasa laĝeto!“

Nu kaj okazis tiel.

Oni venigis la emeritan musketiston Krabaton al la reĝo kaj anoncis al li tie, ke Lia reĝa moŝto bonvolis, konsidere al la grandaj meritoj de sia bona soldato, grandanime donaci al li reĝan bienon en Zĝiro kun ĉiuj parceloj kaj subuloj, ŝafstalo kaj forstista domo, kun muelejo, distilejo kaj bierfarejo kaj kun hereda gastejo.

Ni jam aŭdis, ke la reĝo estis tiun tagon aparte bona, gaja kaj homa. Do ni ne miras, kiam li ankoraŭ aldonas:

„Mia kara Krabato! Mi koncesias al vi la privilegion, ke vi ĉiam rajtas veni al mi ĉiutempe sen avizo. Neniu el miaj ser-vistoj, pordistoj kaj gardistoj rajtas mal-ebligi tion al vi!“

„Mi plezuriĝos per tiu soraba sorĉisto“, la reĝo pensis por si. Tiel Krabato, la iama paŝtisto, muelista kaj migrinta metilerninto kaj saksa musketisto nun mastrumis sur la Zĝira bieno. Alia ne profitus multe el tiu mizera bieneto, sed Krabato estis magiisto kaj sciis, kie la tubero estas en la afero – li sciis helpi al si.

Krabato preparis al si strangan sorĉan spegulon el bronzo. En tiun li ofte rigar-dus kaj ekonus, kio ĉio okazas en la mondo kaj tio estis tre amuza kaj kelkfoje ankaŭ utila. Tiamaniere Kraba-to ofte povis eviti malbonon. Krabato ankaŭ eksciis el tiu sorĉa spegulo, kiam la reĝo ĝuste volis fari iun stul-taĵon aŭ nekapablon, diru ni, kiam li ie komencis malpacon kaj volis komenci militon aŭ kiam li intencis ŝarĝi la mal-riĉan popolon per novaj impostoj por plenigi la malplenan monujon aŭ kiam li volis ĵeti iun senkulpulon en mallibe-rejon aŭ celis al havaĵo de sia proksi-mulo.

Tiam Krabato rememoris pri tio, ke li havis la privilegion rajti viziti la reĝon ĉiutempe sen vizito kaj li vokis sian

koĉeron por ke li rapide jungu kaj veturigu lin al Dresdeno. De Zĝiro al Dresden estas longa vojo, kaj Krabato ja neniam havis tempon. Sekve li ankaŭ ne veturis laŭ la strato, sed kiel vera magiisto tra la aero. Rekte malantaŭ la bieno li leviĝis kun sia jungitaro en la nubojn kaj jam li flugis super Kamenco, Pulsnico kaj la dresdena erikejo rekte al la saksa ĉefurbo al la reĝa kastelo.

La ministro kaj la ĉambrieroj envie rigardis, sed ili povis fari nenion: Ili devis lasi iri la soraban magiiston al la reĝo. Kaj Krabato ne timis la reĝon kaj ankaŭ parolis malkaŝe, li ne flatis al la reĝo, sed libere diris al li sian opinion:

„Tio kaj tio ne decas, tio estus granda senprudentaĵo kaj stultaĵo kaj maljustaĵo, tion reĝo ne faru!“

La reĝo miris grandokule, estis nove al li, ke iu provis vekti lian konsciencon, ĝis nun ĉiuj antaŭ li nur servilis kaj parolis laŭ lia plaĉo kaj komplimentis. Kaj la reĝo ekridus kaj aŭskultus. Kelkfoje li direktus sin laŭ la konsilo de Krabato kaj aŭskultis liajn admonojn, kelkfoje ankaŭ ne, ĉar li estis kaprica kaj ŝanĝiĝema homo, sed li tial ne koleris al Krabato.

Sed nun li terure kolerigis la reĝan ministron kaj la reĝajn ĉambrierojn, konsilantojn kaj la tutan kortegan klikon. Ofte ili ja persvadis la reĝon je iu malsaĝaĵo, el kiu ili tiris grandan profiton kaj tiu soraba bubaĉo tiom ofte denove persvadis la reĝon kaj mallongigis al ili la gajnon.

La reĝo pli ofte aŭskultis Krabaton kaj ruinigs per tio la maĥinaciojn kaj profitojn de la kortega kanajlaro.

La ministro, la ĉambrieroj kaj la konsilantoj ĝemis. Kion fari? Al Krabato ili ne kuraĝis; kun tia magiisto oni ne faras ŝercojn! Ili malvenkus, tion ili sciis.

Sekve ili celis al la reĝo.

„For la reĝon!“, ili opiniis.

„Lia filo, tiu stulta maldiligentulo, konvenus al ni pli bone, tiu certe ne ekkverelos kun tiu soraba bubaĉo! Tiu obeos al ni. Sed la reĝo devas foriĝi!“ Kaj tiuj kortegaj petoluloj renkontiĝis por sekrete interkonsiliĝi kaj elpensis la

jenan: „La ĉefenverŝisto enverŝu tason da venenita kafo al la reĝo! La reĝo falos teren kaj ni estos gajnintaj. Poste tiu soraba sorĉisto ankaŭ estos finsorĉinta!“

Tiu afero ne estis malbone aranĝita kaj estus certe ankaŭ sukcesinta, se Krabato ne estus ĵus rigardinta en sian magian spegulon. Nu, nun li devis rapidi! Krabato, lasinte la koĉeron hejme, mem koĉeris, ĉar li ne havis tempon.

Jam la kaleŝo flugis super la Nigra Elstro, jam li flugis plu, kiam subite – bums – io krakis, la ĉaro puŝiĝis kontraŭ io kaj ekstaris, la du ĉevaloj galopis, sed ne povis plu...

„Damnita limŝtono!“ Krabato sakris, sed poste li rememoris, ke limŝtonoj ja kutime ne estas en la aero, rigardis el la ĉaro kaj ekrigardis, ke li puŝiĝis kontraŭ la pinto de la Kamenca preĝejo turo. Tio estis ĉagrena afero! Sed Krabato rapide levis la ĉaron kaj jam li krucis ĉion flugante.

Ekde tiu tempo tamen la Kamenca turo de Skta. Maria havas kurbigitan pinton. Preskaŭ Krabato estus alveninta tro malfrue al Dresden. La reĝo jam tenis la tason de venenigita kafo en la mano por gluti ĝin. La ĉefenverŝisto, tiu kanajlo, staris apud li, kaj ĉirkaŭe tiu kliko de korteganoj sidis ĉe la tablo ĝoje atendente la morton de la reĝo. Ne malmulte ili ektimis, ekpaliĝante, kiam la soraba magiisto subite enkuregis en la ĉambron.

„Ne trinku, sinjoro reĝo!“ Krabato ekkriis. „La enverŝisto trinketu la kafon! Poste tuj montriĝos, kia diabla bruna saŭco tio estas!“

La enverŝisto tremis kiel aŭtuna folio. Helpis nenio, li devis gustumi la venenigitan trinkaĵon, kiun li mem kunmiks. Li surloke falis teren.

Kaj nun Krabato malkaŝis al la reĝo tiun komploton kaj tiuj konspirintoj ne sukcesis: Ne daŭris longe, ke la maljuĝna ekzekutisto el Lisahoro devis veni al Dresdeno por senkapigi la sinjorajn malbonfarintojn.

12

Trifoje Krabato do tiris la reĝon el embaraso, savis al li la vivon kaj helpis, kiam tiu ne sciis helpi kaj konsili al si. Pri tio oni rakontis en la tuta lando, kaj pri tio, kia lerta, saĝa kaj granda magiisto tio estas. Lia gloro kreskis kiel la alta akvo post printempa degelo. La junkroj nun ne plu malestimis la iaman soraban servutulon kaj paŝtiston, kiun ili alikaze estus enpuŝintaj en la grundon, sed inverse ili alflatis sin kaj komplimentis kun li. Ne povas ja neniam damaĝi, se vi amikiĝas kaj havas bonajn rilatojn al homo, kiu estas renoma ĉe la kortego!

Sed Krabato fajfis pri la flataj vortoj kaj la flataĉeco de tiuj grandsinjoraj hipokrituloj, kiuj altrudiĝis al li kiel kanajlaro kaj ĝenis per invitoj kaj daŭre atakis lin, por ke li ĝojigu ilin per iuj sorĉaĵoj kaj magiaĵoj.

Ne nur la junkroj, sed ankaŭ la popoloj klopodis pri la amikeco kun Krabato. Kial ne, tia amiko de la reĝo estas grava viro, kvankam li estas magiisto, la favoron de tia vi ne rajtas perdi, kaj lia donacema mano ĉiam profitigas.

Antaŭ ĉio la pastro de Vitifjenaŭo enamiĝis al Krabato, li ofte iris al li por babili kaj gastigis lin ankaŭ ofte en la pastrejo en Vitifjenaŭo. Nur, tio tedeĝis al Krabato: La pastro daŭre kaj senĉese petis lin, ke li ja elsorĉu ion por amuzo.

„Gardu vin“, Krabato diris al si iun belan tagon, „mi kaŭzos al vi ion, kion vi longe rememoros!“

Kaj li prenis fasko da aveno kaj ŝutis ĝin en fornelpoton. Poste li murmuris sian parolon el la sorĉolibro kaj el la fornelpoto – vidu – komenciĝis petoli unu post alia multege da soldatoj, tuta kompanio, aĥ, kion do mi diras: regimento da infanterianoj tie grupiĝis kaj sur la korto de la Vitifjenaŭa pastrejo kaj ĉirkaŭe de ĝi ĉio ruĝiĝis per soldatoj.

Tio estis nun bela afero! La soldatoj komencis marŝi tien kaj reen, unu –

du, unu – du, la oficiroj kriegis, kaj la tamburistoj tamburis, la infanterianoj skermis kaj dancetis kun pafiloj kaj bajonetoj, tiel ke la sinjoro pastro kaj lia kuiristino ne povis satvidi sin kaj inter-plektis la manojn pro miro.

La soldatoj tamen nun ĉesis ekzerci kaj militi, evidente ili volis manĝi kaj trinki. Ili do komencis kapti la lokojn, anasojn kaj anserojn de la pastro kaj kolekti la ovojn el la nestoj kaj el la porkostalo ili tiris grasan porkon kaj el la kelo ili alportis botelojn de ruĝa romia vino.

Nun tamen la sinjoro pastro sulkgigis la frunton; tiu afero ne plaĉis al li, tion ni povas kompreni, kaj la sinjoro pastro insiste parolis al tiuj soldatoj, ke ŝtelado estas granda peko kaj ke ili detenu sin de tio, nu, li treege skoldis tiujn soldatojn.

La soldatoj, tiaj grobianoj, nek pentis iom nek konvertiĝis, sed inverse ili tre koleriĝis kaj estis eĉ ofenditaj pro la se-veraj vortoj de lasinjoro pastro.

Ili do skoldis la pastron kaj komencis puŝi lin per pafilkolboj kaj tiklis per spadoj kaj bajonetoj, ke li treege timis kaj pro timo li vokis al Krabato por helpo.

Nu, Krabato ekkompatis, eltiris sian sorĉolibron, legis denove sian sorĉan parolon, sed de malantaŭe, kaj tiel la soldatoj foriris unu post la alia kaj reiris en la fornelpoton, el kiu ili venis, kaj tie en ĝi estis nenio alia ol amaseto da aveno.

La Vitifjenaŭa pastro tamen neniam plu petis Krabaton, ke li alsorĉu al li ion. Li por ĉiam perdis la scivolemon pri sorĉaĵoj, ĉar malsataj kaj ĉagrenitaj soldatoj ne permesas ŝercojn.

13

La servisto de Krabato estis scivolema kaj interesita ulo. Ofte li observis la sorĉaĵojn de sia mastro kaj atentis tre bone.

„Kio tio estas“, li diris, „tia sorĉado, tio ja ne estas granda artaĵo! Vi prenos al vi nigrajn librojn, tiun koraktoron aŭ kiel

tio nomiĝas, elserĉas al vi ĝustan paĝon, grumblas magian parolon kaj jam ĝi estas preta. Tion mi ankaŭ efektiviĝos!“

Kaj li atendis kaj embuskis, ĉu eble lia majstro mem ne veturos ien, lin mem ne postlasos hejme kaj memkompreneble ankaŭ tiun ĉi sorĉolibron.

Nu, tia okazo prezentiĝis: Krabato forveturis ien, mi ne scias, kien, eble al la Vitiĵenaŭa pastrejo aŭ eble ankaŭ ien alien kaj intence postlasis la sorĉolibrojn hejme, por ke li ne bezonu alŝorĉi ion al la scivolemaj homoj por ilia plezuro.

Koncize, la servisto estis sola hejme, kaj tio konvenis ĝuste al li.

Li trovis la korakoron, prenis al si manplenon da aveno, ŝutis ĝin en la fornelpoton, murmuris la ĝustan magian parolon, kaj jam la soldatoj komencis malvolvi sin el la fornelpoto, unu post la alia, tuta regimento – nu, la tuta Zĝira bieneto svarmis de tiaj soldatoj. „Jen ni estas!“ kriis la komandanto de tiuj soldatoj, tia liphara, galonita batmortiganto. „Jen ni estas! Pro kio vi vokis nin? Kion ni faru? Donu al ni servon nun, donu al ni laboron, sed iom da rapide!“

Pro dio – al tio la servisto ne estis preparita. Li paliĝis kaj tremis, finfine li kapablis elbalbuti: „Tie tiun sterkamason sur la korto! Sur la kampon kun tiu sterko, kaj disvastigu ĝin bone!“

„Laŭ via ordono!“ kriis tiu liphara, galonita. „Tio ja ne estas okupo por reĝa saksa soldato, sed ordono estas ordono!“

La soldatoj ĵetis sin al tiu sterko kaj tiu amaso malaperis tre rapide, kiel printempa neĝo. Kaj jam tiu oficiro denove estis ĉi tie:

„Ordono realigita! Plian servon! Alikaze vi suferos!“

Al la servisto ĉiuj membroj tremis. De kie preni laboron por tiom da servutuloj? Finfine li havis ideon:

„Kiel do estus, se vi borus truetojn por la fungoj en nia erikejo?“ Nu – tiu laboro daŭris iomete pli longe. Sed post certa tempo la regimentestro denove aperis kaj grumblis:

„La truetoj estas boritaj! Jam estas tie en la erikejo ĉio plena de tiuj noblaj raspstipaj, ruĝĉapelaj boletoj kaj buterfungoj! Kion nun?“

La veturigisto tordis la manojn, sed fine li havis ideon:

„Iru tien al la Vitiĵenaŭa vojo kaj elfosu ĉe la vojo truon, sed vere grandan kaj larĝan!“

Nu – la soldatoj ekiris kaj eklaboris, elfosis egan truon kaj el tiu sablo, kiun ili elfosis kaj forigis, ili amasigis apude egan sablomonton. Kaj ĉu vi scias, kio estiĝis el tio? Nu – tiu granda laĝeto, kiu iam briletis al la okcidento de la vilaĝo, kaj tiu alta sablomonto, kiu tie apude blankiĝis.

La soldatoj ankaŭ finis tiun ĉi laboron kaj jam ili revenis denove al la Zĝira bieneto. Mi pensas, ke la servisto de Krabato ne estus kapablinta suĉi al si el la fingroj laboron por ili kaj tiam li estus farinta malbonajn spertojn. La ĉagrenitaj soldatoj krude traskuus lin.

Sed feliĉe Krabato ĵus revenis kaj helpis al sia servisto el la timo eksteren. Li legis la sorĉan parolon de malantaŭe kaj jam la soldatoj malaperis obeeme kaj bonkondute en la fornelpoto por retransformiĝi tie denove al aveno. Kaj la servisto ricevis la meritan skoldon:

„Ne ŝovu sian nazon en fremdan vazon aŭ vi brulvundos ĝin! Ĉu vi nun spertis, ke oni ne ŝercu kun la magio? Rezignu pri aferoj, kiujn vi ne kapablas majstri!“

14

La jaroj pasis kaj ankaŭ Krabato fariĝis maljuna, sed li akiris kun la jaroj pli kaj pli multe da saĝeco kaj perfekteco. Neniu superis Krabaton. Li ĉiun kaj ĉion konis, sciis kaj komprenis, li superis ĉiujn, li venkis kaj regis ĉion. Se li volus, li povus esti la plej fama, plej potenca, plej riĉa viro en la tuta lando. Sed ĝuste tion Krabato ne volis. Li ne strebis al potenco kaj famo, nek al mono, trezoroj kaj riĉeco. Kviete li sidis kaj mastrumis sur sia bieneto en Zĝiro. Li ankaŭ ne plu veturis al la reĝa kor-

tego al Dresdenu. Kion do li volu tie? La reĝo, tiu fanfaronulo, diboĉulo kaj disipulo, ĉiam pli malofte obeis la konsilon kaj avertojn de Krabato kaj forgesis lin kaj perdis lin tute el la memoro. Nu, tio estas konata afero:

Reĝoj kaj tiaj potenculoj havas konci-zan memoron por servoj, kiujn iliaj subuloj iam faris por ili.

Krabato ofte pripensis sian vivon kaj diskutis: „Mi do sopiris iam kiel infano al tio koni, scii kaj kompreni ĉion kaj povi kaj kapabli ĉion! Kaj tiam mi fariĝis sorĉisto. Mi helpis al mi kaj al miaj gepatroj, por ke ni ne plu devu suferi.

Kaj mi mortigis tiun malican nigran mueliston, kiu kaŭzis tiom da malbonaĵoj kaj mi helpis al bravuloj kaj malriĉuloj kaj moderigis kelkan fanfaronulon.

Pli malfrue mi daŭre devis tiri dornojn el la postaĵo de tiu granda sinjoro, tiu reĝo kaj ricevis por tio tiun bieneton kun marĉoj kaj sablogrundo, tiun lemnolageton. Nun oni diras, ke mi estas grava kaj nevenkita sorĉisto. Nu, tio estas vera; mi konas multajn kaj mi scias sufiĉe multe kaj mi ankaŭ plenumas kelkion...

Sed kion mi ĝis nun faris kaj efektivi-gis? Multege da sorĉaĵoj. blagoj, bagateloj kaj petolaĵoj! Transformi min al virbovo aŭ pasero, transformi nudelojn al lumbrikoj kaj avenon al soldatoj, flugi tra la aero – al kiu do tio utilas kaj kiu profitas de tio? Io pli grava devas rezulti el tiu sorĉado!“

Kaj Krabato ankaŭ ekkonis, kio estas necesa, nome helpi al homoj kaj efektivi-gi tion, ke ili estus sataj kaj konten-taj kaj feliĉaj kaj gajaj.

Kaj li eklaboris...

Jam de longe li ĉagreniĝis pro tiuj mar-ĉoj kaj marĉejoj ĉirkaŭ la vilaĝo, en kiuj la putra akvo malklariĝis inter sfagno, junkoj kaj miriko kaj kie dum noktoj vaglumoj dancetis.

Nun per la forto de sia scio li ellasis kaj forfluigis el ili la akvojn, por ke bona, dolĉa herbo povu kreski tie kaj ankoraŭ fagopiro kaj milio, lino kaj papavo, cepo, faboj, pizoj, brasiko kaj betoj.

Li daŭre malamamis tiun blankan, sekan sablogrundon, sur kiu nenio volis kreski ol nur tiu mizera erofilo, la malmola korineforo kaj la griza likeno.

Nun tamen li kondukis akvon sur ĝin kaj tra ĝi pere de fosaĵoj kaj ne daŭris longe kaj greno abunde ondadis tie: sekalo, aveno kaj hordeo.

Kiam sekaj ventoj furiozis el la oriento, Krabato metis al ili limojn kaj kiam tia granda varmego kaj sekeco disvas-tiĝis, li vokis la tempestajn nubojn kaj ordonis al ili, ke ili dissolviĝu super la soifanta agro kaj gutetu mielon kaj lakton. Por tio tamen li atentis pri la fojnrinkolto kaj aliaj rinkoltoj kaj forpelis ankaŭ la plej malgrandan nubeton jam de malproksime, por ke ĉio povu esti kolektata bone kaj seka hejme. Kiam tamen foje malgraŭe hajlo falis el la nigraflava ĉielo, tiukaze Krabato ŝanĝis ĝin rapide al blankaj lanugoj kaj al la semoj ne okazis eĉ la plej malgranda damaĝo.

Kaj la brava kaj potenca sorĉisto plu transformis ĉiujn prunelojn al slivoj, prunoj kaj persikoj kaj maturigis bors-dorfaj pomoj sur arboj de sovaĝaj pomoj kaj sorĉis mielpirojn kaj buter-pirojn sur sovaĝajn pirarbojn kaj meta-morfozis lolon al hordeo kaj agropiron al tritiko kaj faris ankoraŭ multe pli multe por la bonfarto kaj la pli bona vivo de siaj vilaĝanoj.

Krabato tamen tute ne estis kontenta kun sia laboro, ĉar li opiniis, ke tio estas ĉiam tro malmulte kaj ke oni devas fari pli multe.

Kaj poste li decidis kaj diris:

„Kio do – mi ankoraŭ regas ĉi tie sur ĉi tiu bieno kaj sur tiu grundo, kiun iam antaŭ jarcentoj tiuj fremdaj rabistaj kavaliroj forprenis al la sorabaj kamparanoj? Kaj ankoraŭ la kamparanoj devas servuti sur miaj kampoj kiel miaj subuloj. Kian rajton do mi havas pri tio nutri min per la ŝvito kaj peno de aliaj kaj ekspluati kaj utiligi malfortulojn kaj senpovulojn, por ke mi mem fartu bone kaj havu neniofaradon? Tio nun tuj ĉesu kaj finiĝu!“

Kaj la bienposedanto Krabato vokigis ĉiujn siajn subulojn, tiujn vilaĝajn ser-

vutulojn kaj la tutan servistaron, aldone la forstiston kaj la bien-administranton kaj ambaŭ distriktes-trojn.

La kunvenintojn li sciigis sur la korto de la bieno, ke la servuteco estas aboliciita ekde nun kaj ke ĉiuj estas liberigitaj de servutoj, sen tio, ke la kamparanoj devas pagi por tio kaj ke ili povas nun translokiĝi, kien ili volas kaj geedziĝi, sen tio, ke ili devas demandi la mastron, koncize, ke ili ne plu estas subuloj kaj servutuloj, sed liberaj homoj.

Kaj Krabato krome sciigis, ke li dispartigas siajn kampojn kaj ĉiujn nemoveblaĵojn al kvardek parceloj kaj ke li fordonos tiujn parcelojn al siaj iamaj subuloj, por ke ili estu por ĉiam ilia propraĵo, kaj ke do ĉio nun apartenas al ili: la tuta bieno kaj ĉiuj agroj kaj ĉiuj herbejoj kaj ĉiu bruto kaj ĉiuj iloj, ĉiuj bienetoj kaj ĉiuj erikejoj. Nur tiujn lagetojn li bedaŭrinde ne povas kaj ne rajtas doni al ili, ĉar li devas redoni tiujn al la reĝo.

Kiam la Zĝiraj mastraj servutuloj aŭdision, estiĝis granda ĝojo kaj jubilo kaj la virinoj ploris pro kortuŝo. Nur la bienad-ministranto, la forstisto kaj la distrikt-estroj rigardis malgajege, ĉar iliaj belaj tempoj nun estis pasintaj kaj ankaŭ la grandkamparanoj ĉagreniĝis, ĉar ili ricevis nenion.

15

Multaj jaroj estis pasintaj. Krabato estis maljuna multjarulo, kiu jam delonge estis griza. Li nun loĝis en supra ĉambro en la Zĝira gastejo kaj la gemastroj zorgis pri li.

Ofte la multjarulo promenis tra la kampoj kaj herbejoj kaj ĝojis pri la nova, feliĉa vivo de siaj iamaj servutuloj. Li vidis kaj ekkonis, kiel la laboro nun ĝojigis kaj nutris ilin kaj donis al ili bonstaton, havaĵon kaj kontentecon. Ili ne plu bezonis la helpon de magio kaj sorĉado.

Do Krabato diris al si:

„Por kio nun ankoraŭ tiu malnova korakto, tiuj sorĉolibroj de la malbona

Nigrakolma muelisto? Tio ja honesta, respektinda, diligenta kaj laborema homo ne plu bezonas! Estas tempo, ke mi liberiĝas de ĝi!“

Kaj li vokis sian maljunan serviston, kiu ne volis forlasi lin kaj transdonis al li tiun koraktoordonante, ke li ĵetu la librojn en la grandan lageton, kiu estiĝis ĉe la Vitijenaŭa vojo per la laboro de tiuj avenaj soldatoj.

La servisto prenis la librojn, sed tiaj utilaj kaj helpaj libroj, kiuj povus havigi al homo diversajn belajn kaj deziritajn aĵojn kaj ankaŭ krome eble esti utilaj, domaĝis lin.

Kaj la servisto ne ĵetis la librojn en la akvon, sed konservis ilin en sia ĉambro sube de la pajlosako kaj reiris al Krabato.

„Nu – ĉu vi ĵetis la librojn en la lageton?“ tiu demandis lin.

„Jes, onklo“, diris la servisto kaj ruĝiĝis. „Kaj kion do la akvo respondis al vi poste?“

Nun la servisto estis en dilemo kaj povis respondi nenion.

„Iru tuj tien kaj ĵetu tiujn librojn finfine en la akvon!“ Krabato nun severe ordonis. La servisto iris tien kaj ĵetis la librojn ĉe la starilo en la lageton.

Hu – tio estis kvazaŭ arda bulo estus falinta en la akvon, nur eĉ centfoje pli malbone kaj terure! La akvo ekŝaŭmis, muĝis, bruegis kaj ekkriis. Poste ĝi bolis kaj disondiĝis kvazaŭ aro da furiozaj akvaj drakoj estus tie moviĝanta, kverelanta kaj furiozanta. La tuta lageto egaligis al kolera maro kaj la servisto timtremis, li preskaŭ svenis kaj li revenis duonmorta hejmen. Krabato tuj ekkonis, ke li realigis la ordonon kaj estis kontenta.

* * *

La vivo de Krabato proksimiĝis al sia fino. Li kuŝis malsana kaj kaduka en la lito en la Zĝira gastejo kaj atendis, ke la blanka virino kiskus lin. La fidela servisto gardis ĉe li. Ankoraŭfoje Krabato rigardis reen al sia tuta vivo kaj al tio, kion li spertis, laboris, agis kaj efektivigis.

Kaj li plendis:

„Malmulte tio estis, tro malmulte! Memkompreneble miaj Zĝiranoj ja estas nun kontentaj kaj feliĉaj, ĉar ili iel bonfartas. Sed ĉirkaŭe estas ankoraŭ tiom da mizero kaj bezono, sufero, malriĉeco kaj maljusteco.

Ĉie la potenculoj tretas kaj supremas la senpovulojn kaj la riĉuloj ekspluatas kaj turmentas la malriĉulojn. Kaj sur la mondo estas ankoraŭ tiom da marĉoj kaj marĉejoj kaj tiom da sekaj sablogrundoj kaj dezertoj, kie bonaj fruktoj povus kreski. Kaj estas ankoraŭ tiom da herbaĉo, mankoj kaj malperfektaĵoj! Kion do povas efektiviĝi ununura homo, eĉ se li estas ĉiopova sorĉisto kaj saĝulo?

Amaso da, ne grandare da tiaj sorĉistoj oni bezonus kaj potencajn, bonajn homojn, kiuj helpus al la homoj kaj popoloj kaj finfine ordigus, transformus kaj turnus la mondon kaj plibonigus kaj perfektigus ĝin, por ke ĉiuj homoj estu gajaj vivi sur la mondo!

Mi ne efektiviĝis tion. Ne gravas! Post mi aliaj venos – se post jarcentoj –, post mi pli potencaj bonaj homoj venos, kiuj transformus la mondon al tia, ke ĝi estos tre, tre bela.“

Kaj poste Krabato ĝemis kaj fermis por ĉiam siajn saĝajn okulojn.

16

Estis tio granda afero kaj grandioza festo, kiam ili entombigis la faman soraban sorĉiston.

La junkroj tamen ne estis venintaj al la akompano kaj ankaŭ ĝenerale tie ne niu el tiuj grandaj homoj estis, el tiuj potencaj kaj riĉaj sinjoroj. Ankaŭ la reĝo ne pensis pri tio, ke li sendu iun ĉambelanon aŭ oficiron aŭ alian komisiiton al la tombo de tiu, kiu ja savis al li la vivon trifoje.

Por tio tie estis la soraba popolo, tie estis tiuj liberigitaj vilaĝanoj, sed ankaŭ tiuj neliberaj servutuloj el ĉiuj regionoj de la soraba lando, el la montoj kaj la kampoj, el la erikejo kaj el la marĉejo. Ĉiuj funebras kaj ploris pro la granda, brava soraba sorĉisto.

Kaj kiam ili malsuprenigis la ĉerkon kun lia korpo en la malhelan tombon, ŝajnis al ili, ke granda blanka birdo, cigno aŭ io simila, leviĝus super la tombon kaj poste kiel granda blanka nubo ŝvebis tra la blua ĉielo.

„Tio estas la animo de la granda Krabato!“ ili flustris unu al la alia. „Li ne forlasos nin kaj zorgos pri ni, por ke ni estu libera kaj feliĉa popolo!“